



## PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Internationale  
Sprache Esperanto

varbilo en germana

lingvo, 8-paĝa

DIN A 5 !

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 24/1975 30 junio 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Socialistoj kaj Esperanto

Romo (pp/rr) La ĝenerala sekretario de la Dana Socialdemokrata Partio, Ejner Hovgaard Christiansen, skribis la 29-an de majo 1975 al Vladimir Mihelj, estro de la internacia oficejo de la Itala Socialdemokrata Partio (P.S.D.I.):

"Kara amiko, mi dankas pro via letero de 21.4.1975. Mi povas konfirmi, ke kiam lastatempe mi ricevis rekomendon pri Esperanto kiel komuna internacia lingvo, mi sendis ĝin al la Socialista Internacio pere de Sinjoro Janitscheck kaj al la Oficejo por Socialdemokrata Partio en la Komuna Merkato pere de sinjoro Dalsager, kaj mi petis, ke oni metu vian proponon en la tagordo por oficeja renkontiĝo en la respektiva organizo.

Koncerne vian kongreson en Romo dum septembro 1976, ni estus tre ĝojaj ricevi inviton, sed kompreneble mi ne povas nun promesi al vi, ke ni estos reprezentitaj".

Siavice, Vladimir Mihelj skribis, la 5-an de junio 1975, respektive al la sekretarioj de la franca socialista partio, de la belga socialista partio kaj de la nederlanda partio de l' laboro:

"Kara kamarado, per nia cirkulero de 23.3.1973 ni komunikis al vi, ke ni proponis al la Socialista Internacio la adopton de Esperanto kiel kuniga lingvo por la socialistaj partioj kaj por la mondo de l' laboro.

Per dua letero de 8.3.1974, ni havigis al vi dulingvan broŝuron (en la itala kaj en esperanto), kiu klarigas la kialojn de nia iniciato, samtempe sciigante nian intencon organizi en septembro 1976 la unuan internacian kongreson de la socialistaj esperantistoj.

La esperanto-asocioj de via lando estas certe je via dispono por organizi esperanto-kursojn por la partianoj, kiuj deziras partopreni en ĉi tiu kongreso.

Ni estus do tre feliĉaj ricevi la konfirmon de via oficiala partopreno.

Ni informas samtempe, ke la Dana Socialdemokrata Partio jam komunikis al ni, ke ĝi akceptis niajn proponojn.

Pri tio, nia kamarado doktoro Alberto Menabene estos en Parizo, Bruselo kaj Amsterdamo inter la 24-a kaj la 27-a de julio, kaj ni estus tre dankaj se vi bonvolus lin akcepti, por havi kun li interŝanĝon de opinioj; li estos akompanata de delegacio de lokaj socialistaj esperantistoj".

Ni aldonas, klarige, ke la letero de la dana socialdemokrata partio estas originale en la angla, kaj tiu de la itala socialdemokrata partio en la franca.

Laŭ Radio Roma

### Speciala oferto

200 glumarkoj kun emblemoj de germanaj Esperanto-kongresoj Oberkirch, Luksemburgo, Braunschweig  
K. a.

3,-- DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo  
85 Nürnberg 1, Postfach 2113 P&k. Nürnberg 81956-851

### Prelegvojaĝoj de eksterlandaj esperantistoj en FRG

Bad Hersfeld (pp) Laŭ informo de Germana Esperanto-Asocio dum aŭgusto kaj septembro okazos prelegvojaĝoj de du eksterlandaj esperantistoj tra FRG.

Ges-roj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, nun en Brazilo, prelegos pri la Esperanto-kooperativo "Bona Espero" en Brazilo.

Jerzy Grum, redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, prelegos pri "Pollando - hodiaŭ" kaj "Esperantofako de Pola Radio".

### Internacia Konferenco de I.L.E.I.

Humblebek, Danlando (pp) De la 18 - 25 julio 1975 okazos en Krogerup Højskole, Humlebek, Danlando, Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

- El la programo:
- 1) La ĝenerala situacio de la lerneja klerigado kaj edukado en la tria mondo.
  - 2) Raporto de la UNESKO-komisiono pri la lerneja evoluo.
  - 3) Ĉefaj juraj dokumentoj kontraŭ rasismo kaj rasa diskriminacio en edukado.
  - 4) Konkretaj eblecoj de ILEI - kontraŭ rasismo kaj diskriminacio - en instruado kaj efektivigo de komuna internacia instruprograme: ellaboro de internaciaj instruceloj.

Krome oni traktos la lerneajn eksperimentojn de ILEI kaj diskutos la starpunkton de ILEI: Neŭtraleco - memstareco, principoj por kunlaboro.

### Finna Esperanto-Librejo

Kuopio (pp) El cirkulero de Finna Esperanto-Librejo, PF 221, SF-70101 Kuopio 10, ni citas:

"Nia urga tasko en la nuna fazo de la internacia kulturo estas la plilarĝigo kaj pliprofundigo, kvalite kaj kvante, de spiritaĵoj kaj dimensioj de Esperanto. La ĉefa parto de nia esperantista mikro-civilizo manifestiĝas kaj konserviĝas per literaturaj valoroj, kreitaj en Esperanto aŭ transportitaj el naciaj trezorejoj de l' spirito.

La libro, relative etkosta kaj facile uzebla, estas ankoraŭ la ĉefa materia portanto de nia bunta kaj varia kulturo, senkompara en riceĉo de ideoj kaj idealoj. La subtenado al la Esperanta libro estas rekta kaj konkreta neceso al la kulturo, kiun ni volas surscenigi en la mondaĵ kadroj kiel lumilon por la homaro.

Tial por rapide kaj efike disvendi la Esperantajn librojn en la tutlanda kaj regiona skalo estas fondita en Kuopio ĉestrata librovendejo sub la nomo "Finna Esperanto-Librejo". Ĝi vendas ĉiajn librojn en Esperanto je minimuma livertempo por moderaj prezoj. La ejo estas malfermita por vizitantoj la lastan sabaton de ĉiu monato je 13 - 14 horo. En la sama ejo rezidas ankaŭ la biblioteko de Lingvoponto, unu el la plej imponaj en la tuta lando."

### Ĉu Zamenhof estis anarkisto?

Romo (pp) En sia lastdیمانĉa elsendo la Esperanto-redakcio de Radio Roma citis el artikolo en argentina revuo de anarkistoj pri Esperanto. La aŭtoro de la artikolo opiniis, ke Zamenhof estis anarkisto, ĉar li pledis por la forigo de landlimoj. Plie la aŭtoro esprimis la opinion, ke Zamenhof estis pli anarkista ol la nunaj esperantistoj.

Lil-Marlen' - la nova Esperanto-himno?

Lil-Marlen'

De Hans Leip (LAJP)

Je la kazerno	Posten' per gesto:
antaŭ l'ega pord'	Eksonas dormsignal';
staris ja lanterno	tri tagojn en aresto! -
kaj staras ĝi laŭ ord',	Kamarad', ja estus mal!-
revidi volas tie ĉi	Ni tiam diris ĝisrevid'.
kaj stari sub lanterno ni	Volonte irus mi en fid'
iame, Lil-Marlen'.	kun vi, ho Lil-Marlen'!
Niaj ombroj iĝis	Vian paŝiradon
kune unuaĵ';	belan konas ĝi,
ke ambaŭ enamiĝis,	donas noktlumadon,
tuj iĝis videblaĵ'.	pensas ne pri mi.
Nin vidu tie plebanar':	Kaj se atingus min fatal',
jen sub lantern' amanta par'	ĉu starus aliul' tial
iame, Lil-Marlen'.	ĉe vi, ho Lil-Marlen'?

El kvieta loko,  
el la tera kuŝ'  
levas min rev-voko  
de l' enama buŝ'.  
Dum turnas sin malfru-nebul',  
mi ree estos lanternul'  
ĉiame, Lil-Marlen'.

(Elgermanigis: Rikardo Sulco)

\*\*\*\*\*

Aktualaj okazaĵoj montris, ke la Esperanto-himno plume de la aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof, ne sukcesis interligi la esperantistojn tiel kaj tiom, ke ne estas antaŭvideble kiam "la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos". Ĝi ankaŭ ne povis malhelpi malakordaĵojn, kverelojn kaj konfliktojn.


Certe, Lil-Marlen' ankaŭ ne povis malhelpi militojn. Tamen eĉ en la plej malluma tempo de la milito tiu kanto estis komuna al la soldatoj de ĉiuj nacioj.

Eble Lil-Marlen' posedas pli fortan efikon por interligi la esperantistojn. Valoras la provo! Ni riskas nenion! Ni nur povas perdi plian esperon!

Prof. Hans Leip, la aŭtoro de la Lil-Marlen', permesis publikigi la tradukon!

+++++++

Pilo-Press, internacia informservo: Jara abonkoto 30,- DM/GM  
Pagoj al Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Postscheck-  
konto Nürnberg 81956-851.



"Ĉu por ĉi tio mi pagas kotizojn?"

Solvopropozo el Bervalio

Legante artikolojn pri ia malkonkordo inter la antaŭhamburgkongres-epokuloj kaj la post-ktp-uloj, mi afliktiĝas, ke multaj UEA-anoj ne lernas el la longa historio de nia movado.

Samideanoj, memoru do, ke post jaroj da disputo ankaŭ la nordbervalanoj iam repaciĝis kun la sudbervalanoj, simple kunfondante belegan E-an fekejon meze de la urbo Bervalo.

Ĉu tiu bervala ekzemplo ne estus imitinda por solvi la hamburgan konflikton? Se jes, ni tuj kolektu monon por tiu nobla celo.

En Bervalo, la 19an de junio 1975

(apud botelo da boĵoleza vino)

Sanon! L. BEAUCAIRE

\*\*\*\*\*

Cetere, se vi volas konatiĝi kun pliaj bervalaĵoj, nepre mendu kaj legu la bervalajn klasikaĵojn:

El la vivo de bervala sentaŭgulo, maldeceta epizodaro  
de Louis Beaucaire

9,-- DM

Kruko kaj Baniko el Bervalo, maldecaj anektodoj por neprudaj legantoj de Louis Beaucaire

16,90 DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113